ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

Novembro 2015 Kol.367/31

xxxx

Vidinte la novan insulon kaj ĝiajn miraklojn, ni miris. Kiu estas afabla pagi por ĝi miliardojn kaj miliardojn da eŭroj? Ĉu Nederlando en la krizo, kiu por ĉiuj homoj fariĝis dolore sentebla? Nu, ni aŭdis, ke 25% da la varoj, kiuj envenas ĉi tien, estas sendata el Ĉinio. Kaj kiel konfirmon de nia supozo ni legis en ĵurnaloj, ke Ĉinio estas konstruanta novan fervojon. Tiu fervojo gvidos de Ĉinio, trans Siberio, Ruslando, Pollando kaj Germanio al Roterdamo. Trifoje oni devas adapti la radŝpurojn, ĉar en diversaj landoj ekzistas diferencaj trakŝpuroj (distancoj inter la reloj).

Kio povus esti la kialo por konstruo de la nova fervojo, kiam "Maasvlakte 2" estas ja disponebla? Jen la kialo: transportado per vagonaro estas pli rapida. La trajno gajnas dek tagojn kompare al la plej rapida ŝipo. Kaj tiuj dek tagoj estas bezonaj por varoj, kiuj ne estas por longa tempo konserveblaj...

Ĉu ankaŭ Ĉeĥio povus iel ĉeesti en la transporta projekto inter oriento kaj okcidento? Ĉu ekzemple per konstruo de elsonĝita kanalo Danubo–Odro–Elbo?

J.M.van der Hoeven, Lopik, Nederlando, aranĝis J.Hron

La paciento ricevas la unuan sentokapablan gamboprotezon

Ĝi povas percepci betonon, herbon kaj eĉ silikon: Esploristoj el Supra Aŭstrio prezentis la unuan gamboprotezon kun artefarita palposento. La regajnita sentokapablo ne estas la sola avantaĝo de tiu nova teknologio.

La esploristoj prezentis en Vieno la unuan gamboprotezon en la mondo, kiu redonas pere de sensoroj al sia portanto la senton de la perditaj ekstremaĵoj, celas ankaŭ helpi al amputitoj ne senti fantomajn dolorojn. La protezo estis disvolvita de la sciencisto Hubert Egger de la faka altlernejo en Supra Aŭstrio.

Estis ankaŭ Egger, kiu alkroĉis al la paciento Wolfgang Rangger per operacio la artefaritan gambon. Estas kvazaŭ dua vivo, kvazaŭ esti denove naskita, diris la 54-jara Rangger antaŭ la publika prezento de la protezo. Al la eksa instruisto en la jaro 2007 necesis amputi la dekstran gambon sube

de la genuo, post kiam sekve de apopleksio formiĝis sangokoagulaĵo. De tiam la patro de la familio portis norman gamboprotezon, sed li estis esence limigita en sia moviĝo kaj suferis dolorojn ĉe la amputa stumpo. Per la nova protezo nun ĉio por li ŝanĝiĝis: Li nun denove sentas ion kiel piedon. Li povas denove senti grundajn formojn kiel makadamaĵon, betonon, herbejon aŭ sablon. Eĉ malgrandajn silikojn li sentas, diris Rangger.

Ĉe la operacio fine de la jaro 2014 estis kunligitaj nervofinaĵoj el la gambostumpo de Rangger, kiuj estis origine kunligitaj kun la piedo, kun sana teksaĵo el la femuro. Sekve la stumpo estis metita en la trunkon de la malpeza protezo, ĉe kies finaĵo ses sensoroj en la pieda plando transsendas pere de tiel nomataj stimulatoroj sensimpresojn al la portanto. Tio alportas du avantaĝojn: Unuflanke pro la nova sentokapablo en la piedo la danĝero pri falo dum irado estas reduktita, aliflanke la refarita transsendo de informoj kontribuas, ke la protezo adaptiĝas laŭ la natura maniero al la korpo de la portanto kaj tiel metas finon al fantomaj doloroj.

La medicinisto Egger jam en la jaro 2010 vekis atenton per brakoprotezo, kiu estas stirebla per pensoj. Tiu protezo en la jaro 2014 estis oficiale aprobita en Usono de la ŝtata aŭtoritato FDA. Sian pioniran laboron Hubert Egger nun transigas al la konstruado de gamboprotezoj kaj li esperas, ke tiu teknologio estonte estos alirebla kaj pagebla por laŭeble granda pacientaro. El la retradio

Kio estas D U O L I N G O ?

DUOLINGO estas senpaga interreta paĝo por la lernado (instruo) de fremdaj lingvoj. Ĝi estis startigita (lanĉita) la 19-an de junio 2012. La ĉefa aŭtoro estas Luis von Ahn (*1979) el Gvatemalo. La plimulto de la kursoj estas por homoj, kies gepatra lingvo estas la angla. La 28. 5. 2015 estis lanĉita ankaŭ kurso de Esperanto por angle parolantaj homoj kaj estas interese sekvi, ke la multeco de la homoj ĉiutage multiĝas per unu milo da homoj, kvankam kelkaj homoj opinias, ke kiam iu scipovas angle paroli, do Esperanto por li nenion signifas.

La 21. 8. 2015 estis tie jam registritaj 100 000 homoj. Kiam la homo tie sin registras, aperas lecionoj ekzemple "Mia nomo estas Petro" kaj la studento

devas skribi en la kadreton "Mi name is Peter", aŭ male, iam estas montrata angla frazo kaj la studento devas kompletigi la frazon Esperante. Ĉiujn kursojn eblas sekvi sur tiu ĉi paĝo inkluzive de la nombro de kursanoj https://www.duolingo.com/courses/en .
S-ro Luis van Ahn elpensis ankaŭ sistemon reCAPTCHA, kiu montros, ke la uzanto ne estas maŝino – aŭtomato, sed vivanta homo. En tia kazo la homo ekvidas miksaĵon de etaj aŭ egaj literoj aŭ numeraloj de mistorditaj kaj la uzanto ĝin devas precize transskribi en la kadreton, alie li estos rifuzita.

Esperantan version kompilis Chuck Smith (1979), usonano, kiu fondis la Esperantan Vikipedion kaj konvinkis s-anon Mirek Malovec por fondi la ĉeĥan. Li klarigis, ke oni planas kurson de Esperanto por grandaj mondlingvoj (francan, germanan ktp.), sed ne por la ĉeĥa lingvo (ĉe Duolingo estas nur la kurso de la angla.)

Estas bone, ke la kurso estas dume nur por angle parolantaj. Kiam la homoj ekvidos, ke pri Esperanto interesiĝas jam cent mil angloj kaj usonanoj, ni esperas, ke ĉesos honte heziti ankaŭ germanoj, francoj, hispanoj, rusoj, italoj kaj pluaj. laŭ la letero de Mirek Malovec

La 88-a SAT-Kongreso

8. – 15. 8. 2015

okazis en la slovaka urbo Nitra, situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madagaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.

Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž. La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo “Anton Bernolák”. En la akceptejo estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris la ekspozicion de diversspecaj bildoj.

Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la semajno. Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri la programo kaj planoj de E@I.

Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj lernolibroj "Esperanto per rekta metodo". Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentata de Johan Derks. Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo *Ĉu ni pretas akcepti grandajn ŝanĝojn?* Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.

Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo.

Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ la japana maniero.

La dua duontaga ekskurso kondukis nin al la urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalejon. Tie oni bredas

plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008. La reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la "reĝa" ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo, imagante la pezan laboron de tiamaj ministoj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo "Banskoštiavnický Betlem" (Betlehemo), kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

Vesperaj kulturaj programeroj konsistis el la prezento de slovaka popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj "Civitano 4" kaj "Ni ne plu estu sklavoj". Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo "No problem" el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj per akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.
La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

Liba Gabalda

Salutoj el Beogrado

En septembro mi vizitis Beogradon. Post mia laborprogramo en la Universitato de Beogrado mi havis unu liberan tagon. Pro tio mi ankoraŭ antaŭ

mia forveturo kontaktis s-ron Dimitrije Janičić – tiulokan esperantiston – kun propono de renkontiĝo. Bedaŭrinde la E-klubo en Beogrado funkcias lunde kaj mi alveturis marde matene. Tamen marde vespere telefonis al mi s-ano Dimitrije kaj kore invitis min al la renkontiĝo por la venonta antaŭ-tagmezo.
Merkrede ni vere renkontiĝis en serba kafejo ĉe la fama beograda Teatro 212 en la Svetogorska strato. Ne nur Dimitrije, sed ankaŭ du liaj amikinoj, E-klubaninoj, bonvenigis min: Tereza Kapista, prezidantino de E-Societo en Beogrado, kaj Bojana Alfirević, ĵurnalistino. Mi pasigis kun ili preskaŭ du agrablajn horojn ĉe babilado pri kongresoj, geamikoj en Ĉeĥio kaj Slovakio; Dimitrije rakontis pri famaj beogradaj personoj, kutimoj kunligitaj kun serba kafejo kaj Teatro 212 (ekzemple artistoj de tiu ĉi najbara teatro priservadas je la Novjaro la gastojn). Dimitrije dediĉis al mi sian poemkolekton „Maturaj Meditadoj“ kaj Bojana sian gvidilon por esperantistoj – "Bonvenon en Serbio" (Dobrodošli u Srbiju), serban – E-vortareton kaj kolekton de gravaj uzataj frazoj.

Konklude: Bojana, Tereza kaj Dimitrije kore salutas ĉiujn siajn geamikojn en Ĉeĥio, precipe el la urbo Pardubice.

Jaroslav Matuška

La 4-a internacia lernado de Esperanto en Bartošovice

Ĉe belega aŭtuna vetero en la tagoj de la 1-a ĝis la 4-a de oktobro 2015 kunvenis en Bartošovice, proksime de Ostrava, Ĉeĥio, 37 interesatoj pri Esperanto el kvin landoj kaj du kontinentoj. El la plej malproksimaj lokoj venis du ĉininoj WU LIU kaj WU Hanping. Pliaj partoprenantoj ĉeestis el Hungario, Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio.

Spertaj instruistoj el Hungario kaj Slovakio ripetis kun ni ĝustajn uzojn de gramatikaj reguloj.
La lingve sufiĉe spertaj ĉeestantoj aldonis al la konversacia kurso interesajn travivaĵojn pri Esperanto. Ofte aŭdiĝis de la klaso rido dum rakontado de gajaj okazaĵoj kun eksterlandanoj. Komencantoj konatiĝis kun la lingvo.

Unu el la ĉefaj vesperaj programeroj fariĝis informoj el Ĉinio. La Ĉina radiostacio "China Radio International" kunlabore kun UEA kaj Agrikultura universitato en la urbo Hangzhou (la ĉefurbo de orienta provinco Zhejiang), organizis internacian konkurson de mallongaj filmoj pri la temo „TEO KAJ AMO“.

Tiun ĉi konkurson ĉeestis ankaŭ du aktivaj membroj de la Esperantista klubo Ostrava–Vítkovice, la redaktoro de „Verda stacio“ Pavel Kaščák kaj lia kunlaboranto Rosťa Čubok. Kune kun infanoj el la bazlernejo en Bartošovice ili preparis mallongan filmon en Esperanto, kiun ili titolis **Rememoro**. Ili sendis la filmon al la ĉina radiostacio por konkursi.

En la konkurson estis liveritaj 45 filmoj el 20 landoj kaj 4 kontinentoj. Granda ĝojo estis, kiam niaj aŭtoroj eksciis, ke ilia filmaĵo gajnis la unuan lokon kune kun naŭ pluaj filmoj laŭ la reguloj de la konkurso.

Kial ĝuste REMEMORO ? Kaj ĉu TEO KAJ AMO?

Ĉar dum trinkado de teo oni ofte rememoras pri dumvivaj okazaĵoj, do ankaŭ pri la amo.

Ambaŭ venkintoj de la konkurso, la unua el Slovakio, la dua el Ĉeĥio, ricevis por sia filmo 10-tagan senpagan restadon en Ĉinio okaze de foirego en Hangzhou. Unue en la historio fariĝis parto de iu foirego ankaŭ festivalo de kurtaj filmoj en la lingvo Esperanto. Ĝi renkontiĝis kun arda intereso de la ĉina publiko.

La nomitaj delegitoj reprezentis sian landon en popolkostumoj kaj per diversaj donacetoj. La plej sukcesa estis la valaĥia ĉapelo. Post la fino de la foirego ili donacis ĝin al muzeo en Hangzhou.

Ili veturis aviadile tra Moskvo kaj Pekino, poste ankoraŭ 1300 km trajne al Hangzhou. Tiun ĉi distancon la trajno traveturis dum kvin horoj (t.e. per rapideco mezume 260 km/horo).

Por ke la vizitantoj ie ne perdiĝu, akompanis ilin ĉinaj studentoj parolantaj Esperante, kiuj estis la tutan tagon por ilia dispono.

En la Agrikultura universitato ili kune kun la ceteraj lernis prepari ĉinan teon.

Ĉu interesas vin la recepto?

3gr da ĉina teo oni ŝutas en la taseton. Oni surverŝas ĝin per bola, varmega akvo kaj lasas ĝin infuziĝi dum proksimume 3 minutoj, ĝis la teo sedimentos funden. Poste oni prenas la tason kun teo per ambaŭ manoj, levas tiujn en kubutoj kaj per malgrandaj glutoj ĝin eltrinkas.

Post fintrinko oni ree en la saman taseton verŝos varman akvon kaj la procedo ripetiĝas.

Dum projekciado de la filmo la vojaĝantoj rakontis al ni siajn impresojn el la vojaĝo kaj la demandoj ne finiĝis. Iliajn travivaĵojn registris ankaŭ la TV Polar Ostrava.

Por la prezentado estis preparita WU LIU, por ke ŝi proksimigu al ni la centjarojn oldan ceremonion de teo-preparo, al kiu oni nuntempe en Ĉinio dediĉas grandan atenton. Tiun ĉi ceremonion oni eĉ instruas en la Universitato kun granda intereso de studentoj. Vere estis bela impreso sekvi la graciajn, preskaŭ dancajn movojn, per kiuj WU LIU ĉion prezentis. Ŝi kudropretigis al si por tiu ĉi aranĝo ĉinan kostumon, kunprenis eĉ tean vazareton, por ke ĉio estu perfekta.

Fine ŝi montris pentradon per teo.

Post la finiĝo de tea ceremonio la ĉininoj proklamis konkurson en prononcado de la nomoj de kelkaj ĉinaj urboj kaj en parta preparo de la teo per kirlado. La venkintoj estis premiitaj per ĉina saketo kun paketoj da teo.

Dum la tuta restado ne mankis promeno tra la ĉirkaŭo en la Odra-regiono.



Ni vizitis ankaŭ rekonstruitan akvomuelejon el la jaro 1928 kun komplekso de akvomastrumaj konstruaĵoj, kiu fariĝis kultura memorindaĵo. Post 17 jaroj ĝi estis malfermita por la publiko.

Kelkaj ĉeestantoj de la renkontiĝo vizitis ankaŭ savan stacion por bestoj en Bartošovice.

Tiu allasis grandajn modifojn de la vivmedio kaj fariĝis vizitocentro. Oni ne povas ne laŭdi!
La 2-an de aŭgusto estis lanĉitaj en liberan naturon la unuaj idoj de nigra cikonio, edukitaj per daŭre handikapita paro en la savstacio. La virbirdo Patrik ricevis satelitan radiostacion, kiu sekvis ĝian movadon dum la flugo trans Vrbno pod Pradědem kaj Levico en Slovakio ĝis la orienta rando de Rumanio. Ĝia fratino Natalka restas provizore en Odra regiono.

Dum unu monato la stacio akceptas eĉ 215 vunditajn bestojn, el tio 80% estas birdoj. Idoj naskitaj en la savstacio estas preparitaj por la vivo en libereco. La cikonioj nigraj kaj la aglo roka nomata TONIČKA *(Antonineto)* havas difektitan muskolan kaj nervan sistemojn post la trapafo per plumberoj kaj tial al ili restos daŭraj postsekvoj.
En la plua vespera programo ni aŭdis kantojn de la kant-ensemblo, kiun oni titolas NO PROBLEM. La kantistoj lernis kantojn en Esperanto, por ke ili povu venontjare prezenti sin okaze de la UK en Nitro.
Kantis ankaŭ la hungara kantistino Anjo Amika kaj ankaŭ ni kune kantis por la ĉinaj amikinoj en la ĉeĥa kaj en Esperanto. Rekompence kantis WU LIU kanton en la ĉina.
La interesa programo postrestigis en ni belajn rememorojn. Al Bartošovice ni ŝate revenos. Jana Křížková, esperantigis Josef Hron.

I n v i t o j

Litova Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la tradiciajn 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de UEA. DATO: La 2-10-a de julio 2016. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio.
LOKO: BET-52 okazos en la urbo BIRŜTONAS, kiu situas 40 kilometrojn for de Kaunas kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius, apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko.

Trista anonco: La 1-an de septembro 2015 forpasis nia praga membrino Jana Pokorná (*1946), kiu jam la tutan jaron loĝis en la Zorgista domo de pensiuloj.
Honoron al ŝia memoro. red.

Perdo de unu ZEO:

En la jaro 1935 estis inaŭgurita "Aleo de d-ro Zamenhof" en la ĉeĥa urbeto

Bělohrad. En julio1959 la aleo estis reinaŭgurita. Sed la urbeto pligrandiĝis, el la sola kuracdomo fariĝis kuraca areo kun kelkaj pavilonoj kaj el la aleo de d-ro Zamenhof fariĝis la ĉefa Kurac-avenuo "Lázeňská". Sur la dua foto estas gimnastikejo sur tiu ĉi avenuo. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.